1a Jaro N° 4 OKTOBRO 1911

# BELGA KATOLIKO

Oficiala bulteno de la

## BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA

(B. K. L. E.)

Nacia Sekcio de la INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA

(I. K. U. E.)

## OKTOBRO 1911

### ENHAVO:

Unua Ĝenerala Kunveno de la Belga Katolika Ligo — La Sepa Universala Kongreso en Antwerpen — Agaĉo de la « Liberpensuloj » dum la Sepa — Nia Dua — Raporto pri la dua Jarkunveno de Nederlanda Katoliko — Bapto de Juna Esperantistino — Brusela Federacio — k.t.pl.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
Ĉe LEO HEIDENDAL
ARENDONK

# La Centra katolika Esperanta Oficejo

« ZAMENHOF »

## ARENDONK

Akceptas mendojn por ĉiuj
Esperantaj libroj.
Vendas Esperantajn verkojn,
Gramatikojn, lerno kaj legolibrojn
Esperantistajn insignojn
k. t. p.

## Kelkaj verkoj el la « Librejo »

| | | |
|---|---|---|
| Spirita Juvelaro | fr. | 2.20 |
| Katolika Preĝaro | fr. | 2.60 |
| La Kvar Evangelioj | fr. | 1.60 |
| Imitado de Jezu-Kristo unua libro | fr. | 1.10 |
| Hebrea Kalendaro | fr. | 0.50 |

k. t. pl.

Baldaŭ Aperos « FABIOLA »
tradukita de
la lerta Samreligianino
« RAMO »

Adresu ciujn mendojn al :
La Centra Katolika Esperanta Oficejo « Zamenhof »
ARENDONK

1a Jaro. Nº 4 OKTOBRO 1911

# BELGA KATOLIKO

ORGANO DE LA
Belga Katolika Ligo Esperantista
(B. K. L. E.)

NACIA SEKCIO DE LA
Internacia
Katolika Unuiĝo Esperantista
(I. K. U. E.)

REDAKCIO : Por ĉio kio koncernas la redakcion (artikoloj — informoj — broŝuroj — libroj — k.t.p.) oni sin turnu al :

ADMINISTRACIO : Por ĉio kio koncernas la administracion (reklamoj — monsendoj — anoncoj — k.t.p.) oni sin turnu al :

Sro Leo Heidendal, ARENDONK.

## *Unua Generala Kunveno*

de la

### Belga Katolika Ligo

Tiu grava Kunveno okazis dum la Sepa Kongreso en la Kunvenejo rezervita por la Lingva Komitato en la Reĝa Ateneo, merkredon 23an de Aŭgusto je la 3a posttagmeze. Ĉeestis 35 gekatolikoj sed ĉiuj ne estis membroj de nia Belga Ligo, ni do ne donos la liston de la ĉeestintoj. Abato Richardson prezidis. Soj Heidendal kaj Mampaey estis la sekretarioj. La Prezidanto malfermis la kunvenon per kelkaj vortoj pri la novfondita Belga Katolika Ligo kaj esprimis sian dankon al Dio por la sukceso de nia movado. Li memorigis la fondon de la Ligo dum la dua Belga Kongreso en Brugo majon 1910 per kelkaj gekatolikoj, kiuj elektis kiel Prezidanton la Respektindan Pastron Honincks Paroĥestron de La Plante Namur, unu el la plej malnovaj kaj plej lertaj belgaj esperantistoj, kaj konstantan korespondanton de « Belga Esperantisto ». Oni samtempe elektis provizoran komitaton. Sed pro diversaj malfacilaĵoj jam klarigitaj en nia unua Bulteno, nia Katolika Ligo nur vivetis ĝis la apero de la unua numero de nia Bulteno en la komenco de la lasta Majo. Per tiu ĉi Bulteno, grandparte Flandre kaj France verkita, oni faris urĝan alvokon al la belgaj katolikoj, por ke ili aliĝu multnombre al nia Ligo, imitante niajn karajn kunreligianojn nederlandajn, kies Nederlanda Ligo jam enhavas pli ol mil membrojn. Niaj klopodoj kroniĝis je bela sukceso. Nia Ligo havas nun 130 membrojn, kaj kalkulas en siaj vicoj multajn pastrojn kaj religiulojn konataj pro sia pieco kaj klereco. Ĉar la nomaro de la membroj estas presita en la Bulteno, estos facila por ĉiu *persone* konstati la gravecon de la Belga Katolika Ligo.

La Prezidanto de la Kunveno tiam memorigas ke, malgraŭ la klopodoj de la agema Sekretario Sro Heidendal, ĝis nun ni ne sukcesis havigi ĝeneralan kunvenon de la B. K. L., sed hodiaŭ ni estis sufiĉe multnombraj kaj ni devis absolute « hic et nunc » elekti Estraron kaj komitaton definitivan por daŭrigi Ligon kiu certe tre baldaŭ iĝos tre grava Katolika Asocio. Li aldonis ke tiu komitato devus esti sufiĉe multnombra por ke almenaŭ kelkaj membroj povus de tempo al tempo kunveni en unu aŭ alia urbo por interpridiskuti la diversajn rimedojn por plibonigi nian societon. Post mallonga pridiskuto, oni fine verkis liston kiun oni proponis al la voĉdono de la kunveno. Tiu listo estis unuanime akceptata sed antaŭ ol ĝin eldoni ni devas averti niajn legantojn, ke kelkaj el la komitatanoj ne ĉeestis la kunvenon, ne estis do eble havigi ilian akcepton. Tamen ni esprimis la esperon ke neniu el ili volu rifuzi la alvokon labori por Dio kaj la Sta Eklezio en nia Katolika Ligo, jen la listo :

Prezidanto. Revindu Pastro Honincks.

Vic-Prezidantoj. Revindu Pastro De Coene

Filosofia D^ro^, kaj D^ro^ Raymond Van Melckebeke, Scienca D^ro^.

Sekretarioj : Pastro Van Oevelen, Zoersel, kaj S^o^ Heidendal, Arendonck (Samtempe Kasisto kaj Redaktoro de « Belga Katoliko. »)

Reprezentanto de Patro De Coene posedanto de Belga Katoliko : Pastro Austin Richardson, Prezidanto de I. K. U. E.

Komitatanoj

Pastroj : Lambo, Huwaert, Minten, Frato Isidore, S^oj^ Van Schoor, Witteryck, Mampaey, Barbe de Kneef, Minon, Van Peteghem, Cocks, Stappers, F^inoj^ Solvijns, Ledène, De Coene.

Honora Membro : La Grafino de Villers-Masbourg.

Pastro Richardson diris ke nia Komitato ne devas esti nur *« nomaro sur papero »* sed agema aro da geliganoj ĉiam pretaj labori por la sukceso de nia afero. La unua devo de komitatano, estas sin interesi en nia movado, kaj penadi por varbi multajn novajn membrojn. Due, ĉiam respondi al la leterojn de la Sekretario, kies tasko estos sciigi al ĉiu membro de la Komitato ĉion kiu interesas la B. K. L. Trie, se eble, ĉeesti la kunvenojn kiuj okazos de tempo al tempo. La Sekretario avertos ilin pri la dato kaj loko. Se ili ne povos ĉeesti konvenon ili devas averti la Sekretarion kaj, se eble, nomi alian komitatanon por ilin anstataŭi kaj voĉdoni por ili. Ni ne povas esperi vidi ĉiujn komitatanojn al ĉiu kunveno, sed por la bono de nia afero, ni esperas ke kiel eble plej multaj klopodos ĉeesti, precipe al nia jara ĝenerala kunveno. Fine, la devo de la komitatanoj estos kore kaj amike interrelati per interkorespondo k. t. p. helpi nin per iliaj sugestioj, sendi informojn interesajn al la Redacio de Belga Katoliko, kaj ankaŭ verki kelkfoje artikoletojn por la jurnalo. Unuvorte, senti ke nia Esperanta Katolika movado estas « Opus Dei » laboro por Dio. Efektive, por ni katolikoj ne estas ludo, amuzajo, ne estas nur filantropia, homa afero. Kvankam ni tre ŝatas tiun « novan senton » : *Esperantismon*, kaj ĝoje partoprenis en ĝi kun niaj karaj gesamideanoj en la tuta mondo, tamen, kiel katolikoj, tiu bela homa movado tute ne sufiĉas al ni, por ni kristanoj, ni katolikoj, unu senlima celo brilas kaj superas ĉian kreiton : la gloro de Dio kaj la savo de la animoj. Jes, por ni, nia kara lingvo estas nur rimedo por plibonigi niajn homajn gefratojn *por la Amo Dio kaj al lia gloro.*

Ĉeestinto

---

## La Sepa Universala Esperanta Kongreso en Antwerpen.

Ĝi estas for en la estinteco tiu grava, sukcesplena kongreso, la plej bela, la plej granda, la plej multnombra kaj certe la plej grava, el niaj kongresoj.

Jam vendredon la 18^an^ multaj gekongresanoj estis alvenintaj, sed la granda alfluo okazis la morgaŭan tagon kaj Dimanĉon. Oni nin sciigas ke la nombro de la kongresanoj superas 1,750.

Sabaton la 19^an^ nia kara Majstro D^ro^ Zamenhof, kun sia stabo, kaj la anoj de la Organizaj komitatoj estis oficiale akceptitaj en la belega Urbdomo kie ilin atendis la Urbestra Moŝto S^ro^ Jan De Vos. La saman tagon je la oka vespere, okazis en la belega Flandra Operejo la koncerton de la Vagabonda Klubo. Speciale mi devas citi la ĉarman bretone kostumitan fortepianistinon F^ino^ Barbin, nia lerta katolika verkistino sub la kaŝnomo de « Speranza ». Ŝia ludo estis vere mirinda kaj tute artplena. Ni ĝuis multe je tiaj « kun brio » Ind'taj muzikaĵoj. Sekve ŝi akompanis ankoraŭ ŝiajn kamaradojn tute improvize, senprepare. Ni aŭdis ankoraŭ gravajn skotlandajn kantojn, kies melodioj multe similas niajn flandrajn kantojn, inter aliaj la belan kanton « La Patrolando » poezio de F^ino^ Agnes B. Deans el Edimburgo. La lerta verkistino sukcesis beligi la muzikaĵon kiu, kvankam simpla, multe placis.

Dimanĉon je la oka, Katolika Diservo en la Katedralo. Lia Dekana Moŝto Kanoniko Cleijnhens, parohestro de la Katedralo, tre favora kaj simpatia al nia movado, aranĝis kun nia Prezidanto de I. K. U. E. Abato Richardson, la dumkongresajn diservojn.

La unuan dimanĉon ni havis specialan Meson por Esperantistoj, kun elokventa prediko de Abato Richardson kiel antaŭpreparado al la ĝenerala Santa Komunio, riĉigita je indulgencoj de Lia Episkopa Moŝto la Kardinalo Mercier. Por tio ni korege ĉi tie dankas Lian Kardinalan Moŝton je la nomo de ĉiuj katolikaj ĉeestintaj Esperantistoj. Post la meso okazis komuna matenmanĝo.

Je la 10a, granda Meso kun mirinda muziko. Sur seĝoj reservitaj per speciala favoro de la Moŝta Dekano, la Esperantistaj kongresanoj ĉeestis ĝin, kaj post la meso ili ankoraŭ partoprenis la mondkonatan Procesion de la Sankta Virgulino. Nia katolika grupo ĉirkaŭante nian belegan verdan standardon, sekvis pie la rondiradon. Ni estis almenaŭ 150, havante kiel estron Lia Moŝton Episkopan Giesswein el Buda-Pest.

Je la naŭa de la sekvanta Dimanĉo ni havis meson dum kiu predikis Pastro Parker, la bonkonata Irlandano. Ĉar multaj angloj nekatolikaj ĝin ĉeestis, li speciale pritraktis la temon « *La Boneco de nia sankta Patrino.* » Tre elokvente li klarigis la patrinan bonecon de nia Sankta Virgulino, al kiu ni ĉiam devas iri por ion peti al ŝia karega filo Jezu. Ŝi estas, estis kaj ĉiam estos la zorgoplena kaj kompatema Patrino. Ŝi estos nia rifuĝejo en niaj kontraŭaĵoj, kaj nia helpo en niaj bezonegaĵoj. Ni do lernu el ŝi la praktikadon de ĉiuj ŝiaj virtoj.

Je la oka vespere ni ĝuis prezentadon de la « Devo de Reĝo » « Por kvietaj Personoj » kaj la « Revuo de la Sepa. » El vidpunkto de la arta deklamo la unua teatraĵo meritis plenan laŭdon, en ambaŭ aliaj la amuza kaj sprita elemento superregis, tamen ĉiuj tri estis varme aplaŭditaj.

Lundon la 23an je la 3a. okazis en la festhalo de la Zoologia Ĝardeno, la solena malferma kunsido. Tiu grandega festhalo estis superplena.

Post kiam la longa aklamado, kiu salutis Don Zamenhof, estis finita, ke Dro Yemans vic-prezidanto de la Seza malfermis la kunsidon, kaj la proponita estraro estis akceptata, Sro Van der Biest dankis pro la honoro al li farita, deziras koran bonvenon al la kongresanoj, kaj esperas ke la Sepa estos fortan antaŭenpuŝon al nia movado. La urbestro Sro De Vos, en la flandra lingvo faris belan paroladeton.

Poste nia Majstro Dro Zamenhof stariĝis, dum senfina aklamado lin salutis, kaj faris paroladon, kiun ni aperigos en nia proksima numero. Ĝi estas laŭdo al la unua kiu laboris, kaj praktike kreis la internacilingvan movadon; la prelato Johann Martin Schleyer.

Post la parolado, la delegitoj de ĉiuj landoj elparolis pli-malpli longan saluton. Speciale oni aplaŭdis la hispanan delegiton kiu pendigis ĉe la kolo de Dro Zamenhof la krucon de komandoro de Izabelo la Katolika. La naciaj delegitoj — senfina vico — venis poste alporti iliajn salutojn. Post tio, la ĉeestantaro entuziasme kantis la « Espero » kaj la kunsido estas fermata.

Post ĉi tiu streĉiga tago la aŭdiĝo de Flandraj kantoj estis vere agrabla distraĵo. O, tiuj belaj kantoj en kiuj vere sin aŭdigas la animo de nia flandra popolo. Niaj patrinoj ilin kantis ĉe la lulilo. Niaj fratinoj ilin kantis dum la ĉiutaga hejma laboro, aŭ promenadante dum la somervesperoj por ĝui la dolĉan aeron de l' patrolando. Ni tutkore dankas ĉi tie la « *Sepo por la Sepa* » por tiu bonega ideo kiu ĉiuj la gekongresanojn plezurigegis.

Mardon kaj sekvantajn tagojn okazis la kunvenoj de la « Rajtigitaj Delegitoj » kiuj en ĉi tiu kongreso, laŭ la projekto de Dro Zamenhof, reprezentis la propagandajn organizaĵojn. Sekve, la rezolucioj de tiu kongreso ne estis submetataj al la tuta kongresanaro, sed nur al la rajtigitaj delegitoj.

La ĉefa solvota demando de tiu kongreso estis tiu « *Pri internacia organizo de la tuta Esperantistaro* ». La proverbo « *kiom da kapoj, tiom da opinioj* » pruviĝis ankaŭ apikebla al Esperantistaj kapoj, kaj nia Majstro estis prava dirante en la malferma parolado « mi rimarkis ke la projekto, » kiun mi prezentis por diskutado dum la » sepa kongreso, ne de ĉiuj estas ĝuste kom- » prenita kaj eble bezonos klarigojn de mia flanko ». Efektive, la diskutoj de tiu delegitaro estis varmaj kaj ofte konfuzaj. Tamen, fine, la principo de internacia « Organizo »

estis akceptata. Nia sepa havis do grandan signifon por nia movado. Tamen dum la venonta jaro la Esperantistaro bone devas pripensi kaj trovi rimedojn por ke tiu ĉefa afero estu sincere kaj grave diskutata dum la oka.

Je la oka vespere, same kiel la morgaŭan tagon, okazis la prezentado de « Kaatje », belega teatraĵo, kvankvam tute simpla, tradukita Esperante de la lerta S^ro Van der Biest. La entuziasmaj eksplodoj kiuj aŭdiĝis post ĉiu akto, estis certe la plej multnombraj kiujn oni iam ĉi tie aŭdis. Ĉiuj meritis laŭdojn, la geinterpretantoj, la tradukinto kaj la regisoro. La elparolado de la geaktoroj estis el la plej bonaj.

Merkredon kaj Vendredon, ni katolikoj havis niajn privatajn kunsidojn. Dum la Unua oni elektis komitaton por nia « *Belga Katoliko Ligo Esperantista* », do tre grava fakto, ĉar ĝis nun ĝi estis sen komitato, kaj ĝin estrigis nur du personoj. Oni vidos en alia artikolo la raporton pri niaj katolikaj kunvenoj. Oni vidos ankoraŭ la okazintaĵon bedaŭrindan de la liberpensuloj kontraŭ la kristanoj ĉeestintaj la kongreson, kaj la proteston kiun ni tiuokazo disdonis.

Jaŭdon posttagmeze oni disdonis la premiojn de la « Literatura Konkurso ». Fraŭlino Flourens (Roksano) gajnis la plej belajn premiojn en la konkursoj 2, 21, (novelo), kaj konkurso 20 (Laŭfundamenta verketo). Ĉi tie ni ŝin kore gratulas. La premio de la 8^a konkurso « Lingvaj rajtoj, estis aljuĝata al S^ro Jakeŝ el Budejovice Bohemujo. La malvastnacianoj kuniĝis dufoje por pripafoli la lingvajn rajtojn, kaj por starigi se eble, Ligon, por kune praktike laboradi. S^ro P^ro Parker, la nelacebla Irlandano estas la kerno de tiu bona movado.

Vendredon, krom kelkaj privataj kunsidoj, neniuj oficialaj okazaĵoj. La Posttagmezo estis dediĉita al ekskurso sur la Skeldo kiu plezurigis la partoprenantojn. Ni multe ĝuis dum tiu boatpromenado pro la diversaj vidindaĵoj, kiujn prezentas la riverego Skeldo kaj ĝiaj bordoj. Je la vespero okazis vivoplena balo en la somerĝardeno de la Reĝa Harmonia Societo. Oni povis admiri ĉarmajn naciajn kostumojn.

Sabaton je la 10^a la ferma kunsido de la kongreso kuniĝis ĉiujn lastfoje en la Festhalo de la Zoologia Ĝardeno. Post legado de raporto de la Lingva Komitato, kaj aliaj faktoj, la kongreso voĉdonis dankojn al la Reĝo de Belgujo, al la Belga registaro kaj al la Organiza Komitato. Ĝi decidis okazigi la 8^an kongreson en Krakovio, la 9^an en Genova kaj la 10^e en Parizo. S^ro Van der Biest fine, deziris feliĉan hejmrevenon al la kongresanoj, ilin dankante pro ilia grandara ĉeestado. Ankoraŭ unu fojon kune ni ĉiuj kantis la « Espero » kaj finita estis la « Sepa. »

La saman tagon ni vidis foriri multajn konatulojn, kiuj, revenante hejmen, tuj komencos kun plej granda fervoro labori por divastigi pli kaj pli nian lingvon.

Kaj ni katolikoj, ni kiuj ĝojas nin Ireprave pro la sukcesego de nia « Dua » en Hago, ni, kiuj ankoraŭ en Antwerpen povis tial utile labori, precipe por nia « Belga Katolika Ligo » Antaŭen ! jes Antaŭen ! nia celo estas alta, kaj nia Esperanta ilo estos nia plej forta helpilo.

L. Heidendal.

P. S. Estas nia devo danki ĉi tie la « Sepon por la Sepa » por la penadoj kaj malfacilajoj kiujn ni, la kongresanoj, al ili okazis. Estis ja « peza laboro, al kiu jam dum pli » ol unu jaro ili dediĉis ilian tempon kaj plej » bonajn fortojn. »

Ni do rediras « Dankon ! Dankon ! Dankon ! »

## Agaco de la "liberpensuloj,, dum la Sepa

Unuafoje en la historio de Esperanto la plej grandaj malamikoj de la homa frateco la de si mem nomataj « liberpensuloj », klopodis jeti la malamon inter la rangojn de la esperantistaro dum la Sepa Kongreso en Antverpeno. Ĝis nun en niaj 6 internaciaj kongresoj, la katolikoj ricevis afablecon kaj samideanan simpation de ĉiuj siaj ne-katolikaj kongresanoj. Nia Kara Majstro donis la plej belan ekzemplon, li neniam mankis gratuli la katolikojn pro ilia fideleco, kaj pro ilia agemeco. Ĉiuj ĉefaj Esperantistoj S^ro Boi-

rac, Cart, Bourlet, la ĝeneralo Sebert, Mudie, S^ro Hankel, unuvoĉe la tuta Esperantistaro neniam perdis unu okazon por certigi al la katolika fako de nia pacema Armeo ke ni Katolikaj Esperantistoj bone meritas la gravan lokon kiun ni tenas inter la rangoj de Esperantismo. Kaj ni povas efektive liere diri ke ni ĉiam kaj ĉie, per nia toleremа kaj amika konduto, klopodas vivi paceme kun niaj karaj gesamideanoj. Ni ja sentis ke almenaŭ unu punkto unuigas ĉiujn Esperantistojn, nome : la Universala Frateco inter la homoj. Pro tio ni zorge evitas ataki iun ajn, kaj nur postulas de la aliaj similan toleremecon.

Tiun belan, veran, esperantistan pacon kelkaj personoj sin nomantaj « liberpensuloj », klopodis difekti, feliĉe sen sukceso. Je la komenco de la Kongreso, malgraŭ la malpermeso de la organiza komitato ili disdonis en la Korto mem de la « Reĝa Ateneo » malindajn folietojn plenaj je insultoj ne nur kontraŭ la religio katolika sed kontraŭ la kristanismo kaj eĉ kontraŭ la S^ta Biblio. Tiel tiuj bigotuloj atakis kaj ofendis la kvazaŭ tutecon de la kongresanoj. Piaj anglikanoj kaj eĉ Israelidoj protestis kun la katolikoj kontraŭ tia malgastema konduto. Malhelpitaj daŭrigi tiun propagandon en la kongresejo, la fanatikuloj presigis malindan folion enhavantan 4 paĝojn da blasfemaj insultoj kontraŭ iu ajn religio, esprimante la deziron ke la kongresanoj for iru el Antverpeno « senigitaj de iu ajn kredo en iu ajn Dio. » Plue sur la tria paĝo aperis bildo tiel senhonta, ke nia respekto por niaj legantoj malhelpas nin eĉ ĝin priskribi. Sufiĉas se ni diras ke la celo estis insulti niajn vittajn monaĥinojn. Tiu ĵurnalaĉo, kun la titolo « *Esperanto* » oni disdonis en la strato al ĉiuj kongresanoj, ni memorigas ke « *Esperanto* » estas la titolo de la oficiala jurnalo de U. E. A. bonega Asocio kiu enhavas multnombrajn katolikojn kaj kristanojn. Forpreni tiun titolon estis do malhonesta ago, volante farita, por trompi la publikon.

Preskaŭ ĉiuj kongresanoj malaprobis, sed la katolika fako de la kongreso tuj agis. Ni presigis 2000 ekzemplerojn de Protesto kontraŭ tiu malinda ago, kaj disdonis ilin al la kongresanoj antaŭ la fino de la sama tago.

Nia protesto ricevis la preskaŭ unuanimаn aprobon de la Kongreso. Unu membro de la Organiza Komitato venis ĉe la Prezidanto de la I.K.U.E. kaj certigis al li ke tia ago estas tute kontraŭ la volo de la « Sepo por la Sepa » kiu estis ĉion aranĝinta por eviti iujn ajn religiajn disputojn dum la Kongreso. Tiu sepano petis la Prezidanton de I.K.U.E. skribi leteron al la Oficiala Ĵurnalo de la Kongreso por tute senkulpi la « Sepo. » Kvankam tio neniel estis necesa, ĉar ne nur la Katolikoj, sed ĉiu membro de la Kongreso konstatis la afablecon kaj plenan senpartion de la « Sepo por la Sepa », tamen, por kontentigi ilin, la jena letero aperis en la lasta N^ro de la Oficiala Ĵurnalo :

Pri protesto

Ĉar kelkaj personoj miskomprenis la proteston, kiun kelkaj katolikaj esperantistoj publikigis kontraŭ la disdono de jurnalo atakanta ilian religion, proteston kiun mi mem la unua subskribis, mi jen deklaras ke tiu protesto tute ne sin turnas al « La Sepo por la Sepa » kiu neniel estas kulpa pri la okazintaĵo

Austin Richardson
Prezidanto de I. K. U. E.

Niaj legantoj konstatos ke tiu agaĉo de kelkaj bigotuloj nenion pruvas kontraŭ Esperanto, tamen ĝi naskas kelkajn konkludojn kiujn ni ne devos forgesi.

1^e Se Esperantismo volas daŭri kiel internacia movado ĝi devas resti absolute neŭtra.

2^e Ne la religianoj, katolikoj, protestantoj grekoj, hebreoj k.t.p. komencis difekti la neŭtralecon de niaj internaciaj kongresoj, sed la « liberpensuloj ».

3^e Estas ne eble elpensi titolon pli falsan ol *liberpensuloj* por tiuj sektuloj. Detrui kaj persekuti la liberecon de aliaj, jen ilia celo en ĉiu lando kie ili iĝas mastroj.

4^e Ni katolikoj devas nun bone kompreni ke, se ni lojale akceptas la neŭtralecon ĉe niaj esperantistaj kongresoj, tamen estos nia devo, *kiel* katolikoj, uzadi la rimedon de la Internacia lingvo por la propagando de la sola vera religio, kiu sola povas doni la veran liberecon, laŭ la vortoj de la S^ta Skribo « La vero vin liberigos ».

# « NIA DUA »

Laŭdata estu Jezu-Kristo! Per tiuj vortoj ni malfermis nian Kongreson; per la samaj vortoj mi nun dankeme memoras tiujn benitajn tagojn. Apenaŭ mi povas kredi ke nia dua Kongreso finiĝas, ke ĝi estas jam historia fakto!

Ho! kiam mi memoras la penadon de la estinteco, mi revidas tiun Kunvenon en Barcelono je 1909, kiam nia kara Colas proponis kaj devigis la entuziasman ĉeestantaron dekreti per unanima voĉdono la 1[an] Katolikan Esperantan Kongreson en Parizo, dum la Paska Festo 1910! Poste mi revivas tiujn penplenajn momentojn de preparado, tiujn du horojn pasitajn en la antaŭ-ĉambro de Lia Moŝto la Ĉefepiskopo de Parizo, la malfacilaĵojn de la agema kaj sindonema Organiza Komitato, niajn timojn, niajn esperojn, la ĉiaman optimismon de la Kara Colas, la tremojn de la maljuna Prezidanto. Ĉion mi memoras, precipe la mirindan momenton kiam mi staris en la « Auditorium » de la Katolika Instituto, iam la Kanonikejon de la Klaŭstro Monakejo de Vaugirard, kaj malfermis « nian Unuan » per la vortoj: « Laŭdata estu Jezu-Kristo ».

Granda, bela, sukcesplena estis nia « Unua », sed multe pli bela estis nia « Dua ». Kompreneble, la agema Organiza Komitato en Hago, kies tri membroj ĉeestis la « Unuan », profitis je la sperto de la pasinta Jaro. El tiu Trio S[oj] Lutkie kaj Sleijffers estis la du Vic-Prezidantoj, kaj S[o] Luneman estis unu el la plej agemaj Komitatanoj. Apenaŭ estos necese diri ke ĉio estis en ordo. Ne eble estos sufiĉe laŭdi la laboron de la nelacigebla Sekretario D[ro] Smulders. Al li ni ŝuldas la ordon praktikan de la Kongres-Regularon, la rezumojn de la pritraktotaj temoj, la deziresprimojn antaŭe presitajn k.t.p. Mi ne pligrandigos se mi diros ke niaj estontaj Kongresoj devos nur fidele kopii la regularon kaj metodon de nia Dua, kies gloro estos ke ĝi starigis la Fundamenton de nia Katolika Movado. Eble, espereble, ni povos pli kaj pli perfektigi, sed mi estos konvinkita ke, estonte, ĉiuj niaj Kongresoj nur sekvos la planon kaj la regularon, almenaŭ escence, de Nia Dua. Sed la ĉarmo de nia Dua naskiĝis ne nur de la ordo perfekta kiu regnis ĉe la Kunvenoj. Ĉio ŝajnis kontribui al la perfekteco de la Kongreso: belega vetero, belega Urbo, amindaj kaj gastemoj landanoj, interesaj kaj bonarangitaj ekskursoj. Nenio mankis por kontentigi kaj ĝojigi ĉiun kongresanon jes, tamen mankis *io*: mi ne aŭdis dum la tuta Kongreso eĉ unu plendon, kaj Kongreso sen plendoj ŝajnas esti iome kontraŭ-natura, ne vere?

Unu el la ecoj de Esperanto estas ke ĝi grade, sed nepre, detruas absurdajn antaŭjuĝojn, la malbenatajn fruktojn de la disigo inter la diversaj nacioj, kaŭzatajn de la diverseco de la lingvoj. Nun per Esperanto la popoloj komencas interkonatiĝi, kaj ni konstatas ke ne ekzistas malbonaj nacioj, sed en ĉiu nacio ekzistas bonaj kaj malbonaj *homoj*. Kiel estas eble ke oni instruis al ni de nia infaneco ke la nederlandanoj estas malvarmaj, flegmaj, egoistaj! Mi povas nur diri ke nek en Parizo, nek en Barcelono, kies urbanoj havas la famon de la entuziasmo, mi spertis pli da gastemeco pli da ĝoja, aminda kamaradeco, unuvorte pli da entuziasmo, ol en Hago dum nia Dua. Ĉu ni ŝuldas tion nur al Esperanto, nur al la ligilo de la komuna lingvo? Tute ne, la tuta Urbo, la ne ankoraŭ esperantista popolo, akceptis nin aminde. La nederlanda popolo montris al ni, siaj gastoj, el 19 diversaj landoj, sian veran amindan ĝentilan karakteron, kaj, forirante de Holando, ni diris laŭte ke tiuj, kiuj devis plendi pri la Holandanoj, ŝuldis tion ne al la nederlanda karaktero, sed al siaj propraj difektoj. Efektive, multaj fremduloj vizitas fremdajn landojn ne kiel amikoj, kaj gastoj, sed kiel malestimantaj kritikuloj. La holandanoj estas patriotoj, ili estas fieraj je sia nobla laborema lando, kaj, kompreneble, ili ne toleras plezure tiujn kiuj venas ĉe ili por moki aŭ por kritiki.

En tiu ĉi mallonga skizo mi ne havas la tempon aŭ la lokon por fari raporton pri la laboro de la kongreso, mi nur parolos pri kelkaj punktoj kiuj certe igos nian Duan memorinda en la historio de Katolikaj Kongresoj. Kiom da Internaciaj Katolikaj Kon-

gresoj okazis de post la unua Kongreso de Mechelen 1864! Tamen mi opinias ke mi ne eraras dirante ke nur en nia Esperantistaj Kongresoj oni oficiale pritraktis 3 gravajn temojn: la unuiĝo de la kristanaro per la submetiĝo de niaj karaj disigitaj fratoj al la S^ta Seĝo, la starigo de vera internacia apologia Societo por la defendo de la S^ta Eklezio, kaj de siaj ministroj, kaj fine la partopreno de la Katolikoj, *kiel katolikoj*, al la tutmonda Pacifisma movado. Diru ni kelkajn vortojn pri ĉiu el tiuj temoj.

Jam en Parizo, sed pli klare en Hago, Anglikanaj Pastroj venis kiel gastoj al Katolika Kongreso, kaj humile petis la permeson esprimi sian senton pri la disigo de sia Eklezio de la Dia centro de Unueco, la S^ta Roma Seĝo. La Rev^do S^o Tovey en sia rimarkinda parolado ne venis por proponi tute ne akcepteblajn kondiĉojn aŭ koncesiojn. Li ja komprenis ke la S^ta Roma Eklezio estas nur la konservanto de la Dia rivelado, kaj neniam povas cedi de ĝi eĉ unu ioton. S^o Tovey venis al nia Dua konfesi kaj rekoni ke sia Eklezio estas for la Unueco, volata de Kristo. Li venis por certigi al ni ke multaj el siaj samreligianoj bone konstatis kaj bedaŭras sian nunan staton, kaj forte klopodas, kaj fervore preĝas por la baldaŭa unuiĝo, kiu devas okazi per la submetiĝo de la Anglikana Eklezio al la Die starigita Aŭtoritato de la « *Cathedra Petri* ». Pro tio li venis peti la simpation, la preĝojn, kaj se eble, la kunhelpon de la katolikoj. Ĉu tio ne estis bela manifestacio, ĉu ni ne bone komprenas ke Lia Episkopa Moŝto Mgr Calier povus permesi eĉ al ne-katoliko veni fari al nia kongreso tian paroladon? Nun restas al ni la devo fervore preĝi por niaj karaj fratoj disigitaj, laŭ la ekzemplo de nia S^ta Patro la Papo, kaj « klopodi per » ĉiu rimedo al ni permesita de la Ekleziaj » Aŭtoritatanoj, kuraĝigi ilin, kaj kunlabori » kune en tiu tiel ŝatinda movado » jen la lastaj vortoj de la deziresprimo, sendita al la S^ta Seĝo kaj al la Episkoparo.

Due, estas bedaŭrinda fakto ke ĝis nun ekzistas neniu vera efektiva *internacia* societo por defendi la S^tan Eklezion. Veraj estas la vortoj de nia deziresprimo: « Kvankam, tieĉi kaj tie, ekzistas meritplenaj lokaj » aŭ naciaj societoj por defendi la Eklezion » kontraŭ la malpia presaro (ekzemple en » Gento kaj Seraing en Belgujo, kaj ankoraŭ en aliaj landoj) tamen neniu societo vere » internacia kaj tutmonda ekzistas por defendi » nian S^tan Religion, kontraŭ atakoj ĉu kontraŭ » niaj dogmoj, ĉu kontraŭ la membroj de nia » pastraro. »

Tiu bedaŭrinda fakto instigis pian kaj ageman pastron anglan, kiu ne ankoraŭ konis Esperanton, proponi al la Katolika Kongreso antaŭ ne longe kunveninta en Newcastle, (Anglujo,) la starigon de tia internacia tutmonda Apologia Societo, sed li baldaŭ devis konstati ke la plej granda malfacilaĵo estis la diverseco de la lingvoj. Tiu pia pastro S^o Donling, ĉeestis nian kongreson kie li faris al ni paroladon parte angle parte france, kiun oni poste tradukis al la ĉeestantaro. Li sin laŭte deklaris konvertiĝo al Esperanto kaj promesis tuj lerni nian internacian lingvon kiu li nomis « rimedo donita de Dio por ebligi nin defendi la Eklezion en ĉiu lando ».

Fine mi mem havis la honoron paroli pri la Pacifisma movado, kaj pri la devo por ni katolikoj partopreni oficiale en tiu homema movado. Honteme ni devas konfesi ke pro nia propra kulpo, ni permesis al ne katolikoj, eĉ al ne kristanoj, preterpasi nin en nia movado kies celo estas plenumi la volon de Kristo: « amu vin la unuj la aliajn », « et in terra pax hominibus bonæ voluntatis ». Jen tamen movado en kiu katolikoj povas sendanĝere kunlabori kun ne katolikoj, kondiĉe ke ili laboru ĉiam sub la direkto de siaj eklezia Aŭtoritatuloj kaj nia Sankta Patro la Papo, la Eminenta Kardinalo Mercier kaj multaj aliaj Prelatoj oficiale jam benis tiun movadon. En Belgujo kaj Francujo jam ekzistas Katolika Pacifista Societo sed tio tute ne sufiĉas. Ni bezonas Internacian tutmondan Societon de katolikaj Pacifistoj kaj por bone kaj praktike starigi tian Societon internacia lingvo estas nepre necesa. Nia Dua starigis la fundamenton de tiu Societo. Dum la Kongreso mi vizitis kelkajn estrojn de la Pacifisma movado en Hago inter aliaj mi interrilatis kun la eminenta

So Dro M. de Pinto, Prezidanto de la mondfama Societo « La paco per la rajto » « Vrede door Recht » li esprimis al mi la ĝojon de ĉiuj Pacifistoj vidi ke fine la katolikoj komencis postuli sian rajtpravan lokon inter la unuaj vicoj de la Pacifisma movado « Vi nur » sekvas la instruon de via Religio », li diris al mi. Dank' al la influo de Dr de Pinto ni havigis al la tuta kongresanaro la permeson, ĝis nun ne ankoraŭ donitan, viziti la belegan « Palaco de la Paco » nun konstruatan en Hago. Ĝi devas esti tute konstruita antaŭ la proksima Internacia Packongreso, kaj ĝi nepre estos unu el la mirindaĵoj de la mondo. Nia deziresprimo estis ke ĉiu katoliko tuj iĝu membro de la Katolika Ligo por la Paco. Ni petas niajn belgajn kunliganojn sin turni al M. Jacques-Houssa, Notaire à Waremme, Prov. de Liege. Sekretario de la Belga Katolika Ligo kiu plezure akceptus iliajn aliĝojn. La kotizaĵo estas nur 1 franko jare.

Sed mi devas fini tiun tro longan artikolon memorigante al niaj legantoj ke Mgro Alex Giesswein, Prelato kaj Deputato en la Hungaria Parlamento invitis la I. K. U. E. teni sian trian Kongreson en Aŭgusto 1912 en Budapest. Mi esperas ke la belgaj katolikoj multnombre aliĝos. En nia proksima Bulteno mi esperas jam povi doni kelkajn utilajn detalojn pri « Nia Tria. » Jam mi povas diri ke, dank', al la influo de nia Altestimata Prezidanto Mgr Giesswein, la vojaĝo kaj loĝado ne kostos tro multe, kaj eĉ ni malriĉuloj, povus partopreni. Do komencu ni jam ŝpari monon por « nia Tria », ne forgesu ni la anglan proverbon « Zorgu pri la spesoj, la spesmiloj zorgos pri si mem » « take care of the pence, the poundswill take care of themzelves ». Do, la Dua estas finita,

Vivu nia Tria.

Austin Richardson.

## " NEDERLANDA KATOLIKO „
## Raporto
## pri la dua Jarkunveno.

La dua jarkunveno de nia ligo « Nederlanda Katoliko » okazis la 13an de Aŭgusto lasta en Hago ('s Gravenhage). Je la naŭa matene multaj membroj ĉeestis la Sta Meson kun prediko esperanta kaj komuniiĝo (ĝin oferis speciale por nia Ligo ĝia Prezidanto Pr L. J. J. M. Poell.)

Je la 12 1/2a la prezidanto malfermis la kunsidon, dezirante al la multnombraj ĉeestantoj « koran bonvenon », precipe al Rev. P. o. G. van Poppel el Berlino. Poste la ĉefsekretario legis la notojn de la antaŭa jarkunveno, kiuj plene estis aprobitaj. La jarraporto de la ĉefsekretario sciigis al ni la ĝojegan fakton ke nia ligo senĉese prosperas. Je la fino de la antaŭa ligjaro membriĝis 763 personoj kaj 12 sekcioj, sed dank' al niaj fervoraj propagandistoj la nombro nun estas pli granda.

Kvar novaj sekcioj plifortigis niajn rangojn. Bedaŭrinde ke unu el niaj plej maljunaj sekcioj, « La juna katolika gvardio » elligiĝis malgraŭ la klopodoj de nia subprezidanto S. ro P. J. L. Niesten. Je la 30a de Junio 1911 la ligo kalkulis 725 membrojn en 15 sekcioj kaj 215 generalajn membrojn, do nombron da 940 membroj.

Diversaj sekcioj laboris fervore per kursoj, kunsidoj, paroladoj. k. t. p. por varbi novajn membrojn.

La komisiono por la propagando faris 13 paroladojn en 9 diversaj urboj aŭ vilaĝoj. Precipe P. o. H. Linnebank, P. o. F. Severijns kaj S. ro P. A. Schendeler eksterordinare klopodis ; per ilia persista diligenteco la Esperanta movado tre disvastiĝis en la sudaj provincoj de nia lando.

Kortuŝaj batoj trafis la komisionon por la presaro, unue la sekretario P. o. G. van Poppel foriris al Germanujo, la poste elektita sekretario P. o J. W. van der Wal, kiu kun fervoro kaj oferemo volis plenumi sian taskon, estis malhelpita per malsaniĝo kaj frutempa morto. Dio donu al li la eternan feliĉon..... La nuntempa funkciisto, la Rev. P. o H. Linnebank, estas agema propagandisto. De post la monato Marto ĝis Aŭgusto li sendis 5 artikolojn al 35 katolikaj gazetoj kaj verkis 7 ĉefartikolojn

por diversaj ĵurnaloj katolikaj. Ankaŭ S. ro W. Lutkie preparis artikolojn kaj nia prezidanto P. o L. J. J. M. Poell presigis klarigojn pri Esperanto kaj nia ligo, precipe en laboristaj gazetoj.

Nia kasisto sciigis ke la enspezoj dum la ligjaro estis Sm. 445, — kaj la elspezoj Sm. 439, — do saldo da Sm. 6, —, sed per tia malgranda sumo li devas pagi ŝuldon da Sm. 674.—. Kompreneble, tio estas neebla, kaj nia ligo nepre bankrotos, se...... vi ne tuj malfermu vian monujon kaj sendu monon al nia kasisto (Jen sia adreso: S. ro Ph. C. van Erp, Antwerpschestraat 27, Bergen op Zoom.)

Post la raporto de nia kasisto, oni paŭzis kelkajn minutojn. Dume komisiono por la ekzameno de la rajtigdokumentoj de la deputatoj kunvenis kaj post la remalfermo sciigis ke 5 sekcioj ne sendis deputaton, kaj rilate la 10 aliaj « ĉio estas en ordo ».

La tuta ĉefestraro devis eksiĝi, sed estis tuj reelektebla. Escepte P. o G. van Poppel, kiu pro restado en eksterlando devis rifuzi, ĉiujn ĉefestraranojn oni reelektis. S. ro P. A. Schendeler el Veghel, nia fervora propagandisto, anstataŭas P. on G. G. van Poppel.

La propono de la sekcio Tilburg: « La ĉefestraro faru ekzamenon pri la stato de Esperanto en la katolikaj instruejoj », estis post kelka diskutado voĉdone akceptita. Same la propono por akiri plej bonan reguladon de la ekzameno por akiri la « ateston de kapableco ». La propono de la ĉefestraro por altigi la kotizaĵon, same kun nova propono de la sekcio « 'sGravenhage », por ŝanĝi la ligan regularon ricevis la plenan aprobon de la deputatoj.

Pri la ŝuldo de nia ligo, la persono proponis eldoni obligaciojn senrentajn, ekzemple de Sm. 4.20 (5 guldenoj) kaj per tiu mono pagi la ŝuldon al nia presisto kaj aliaj kreditoroj. La ĉefestraro promesis preni aranĝojn por amortizi la ŝuldon.

La prezidanto instigis la ĉeestantojn por fari propogandon, precipe post « Nia Duà », ankaŭ inter la laboristoj, petis kanti « Himno Katolika » kaj fermis la kunsidon per la kristana saluto « Laŭdata estu Jesu-Kristo ».

Post la fermo de la kunsido la partoprenintoj unuiĝis por la komuna tagmanĝo; ĝi finiĝis tre festene, societeme. La festo tago fariĝis per veturado al Scheveningen, fama banloko al la norda maro, apud 's Gravenhago. Mallonga promenado laŭlonge la marbordo kaj vizito al la enmarpromenejo, kie oni dum kelka tempo kune festadis. Poste la partoprenintoj disiris. Ĝis revido, karaj geliganoj, sed dume fervore laboru, por ke venontan jaron nia membraro estu duobligita.

Utrecht, Septembro 1911.

H. B. van Zwet.
Ĉefsekretario de
« Nederlanda Katoliko »

## BAPTO DE JUNA ESPERANTISTINO

Dimanĉon la 1an de Oktobro, en la bela preĝejo de St. Gilles, antaŭ urbo de Bruselo, okazis la bapto de la filino de Sro. BAEZ, la agema Prezidanto de la grupo « ANTAŬEN ».

Pastro Richardson, Prezidanto de la I.K.U.E. faris tiun belan ceremonion, permesita de la Respektinda Dekano, la paroĥestro. La ĉeestintaro estis multnombra, tial ke Sro. Baez havas multajn amikojn Esperantistajn kaj ne-esperantistajn. Post la bapto, pastro Richardson diris kelkajn vortojn *esperante*. Li memorigis la gepatrojn ilian devon doni al la juna « CARMEN » kiu hodiaŭ renaskiĝis al supernatura vivo, unue, la ekzemplon de pura, virta vivo, kaj due, la multvaloran donacon de Katolika edukado. Poste, li parolis pri la plej granda el la virtoj, t.e. la KARITO. Li diris ke li ĝoje konstatis ke la plimulto de la esperantistoj klopodis plenumi la ordonon de l'Kristo: Amu vin unu la aliajn, kaj li admonis ilin igi tiun homamon supernatura. Por tio estus nur necesa ami la homojn pro nia amo al Dio Tiel la natura virto iĝus supernatura, iĝus la karito, kiu kondukas nin al la eterna vivo en la ĉielo.

Ni prezentas niajn tutkorajn gratulojn al la junaj feliĉaj gepatroj Sro. kaj Sino Baez, kaj niajn bondezirojn por la eta « CARMEN » ilia filineto. (Ne korektita.)

# Novaj Membroj.

S-ro E. Cuvelier, farmaciisto, Antwerpen.
R-da S-ro Abato Van Giel, Tremeloo.
S-ro J. Van de Velde. Mechelen
S-ro K. Van Hees, Beverloo.
R-da S-ro Abato Kempenaars, Brussel.
S-ro L. Dederichs, Brussel.
F-ino Maria Blomme. Lophem/Brugge.
F-ino Marg. Sieleghem. Kortrijk.
R-da Abata Minten, Antwerpen.

---

La kvin Bruselaj Grupoj:
La Zamenhof
La Brusela Grupo
La Antaŭen de S^t Gilles
La Grupo de Forest
La Grupo de la Blinduloj de Woluwe
kunigis kaj formis « Federacion » sub la insigno de S^{to} Mikaelo la Ĉefanĝelo faligante la diablon, kun la pera devizo « Ni venkos kiel li venkis »

KATOLIKOJ, ĴUS APERIS !!!

la belega preĝlibro la

« SPIRITA JUVELARO »

mendu ĝin tuj, al la

« Centra **Katolika** Esperanta **Oficejo** »

ARENDONK

## INTERNATIONAL CORRESPONDENCE EXCHANGE.
(I. C. E.)

Monata ĵurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la interŝanĝo de poŝtmarkoj. kaj korespondado per ĉiuj lingvoj. la Abono — frkj. 2,50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio: Avenue du Moulin. 16. Forest-Bruxelles.

## PROPONOJ POR INTERKORESPONDADO.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ.

S° Petro Stolk, 32 Waterloostraat, den Haag. Hollande (precipe kun gekatolikoj).
D°° Marko Pavloviĉ, reĝa, trib-juĝisto. Temes var. Hongrie. I.P.K. kaj L.
Rev. P. Primavesi. S^t Bridgets Catholic Church Warrington. Angleterre (li povas doni adresojn).
F^ino Ina Crafer, 6, Hanover Road. Norwich, Angleterre.
Rev. Pastro Desray, Profesoro, Ancenis France.
Rev. Pastro Dol. Valensole. Basses Alpes France, I.P.K.
F^ino Elly Hanau, 32 Moritzstrasse. Wastadeno, Allemagne, I.P.K.
F^ino Anna Köhler, 52 Casselerstrasse, Wolfsanger bei Cassel, Allemagne.
Miss Campell Brown Glenlosia, S^t Davids Street Lyttleton. New Zeoland, I.P.K.
S° J. L. Stanyan, Montpelier, Vermont Etats Unis, Amerique.
N. B. Estas devo je honoro respondi al ĉiu korespondanto almenaŭ unufoje.


## Rekomendindaj Firmoj

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai.
Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro BOSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpaĵoj : ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX kaj Filoj : 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.

# LIBREJOJ Esperantistaj

A. J. Witteryck, Presisto-Eldonisto, Brugge.
Spineux & C^ie Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20. Paris.
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

# HOTELOJ

COURTRAI : « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenejo por Esperantistoj.

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenejo.

Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En belega loko, apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.

La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.

**Oni parolas Esperante.**

LONDONO : Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ». Sinjorino O'Connor « Esperanto House », 17, St. Stephens Square. Bayswater, London, W. Tre moderaj prezoj.

# EKSPED-AGENTEJO

THOS COOK & SON.

LUDGATE CIRCUS

LONDON

Filioj tra la tuta mondo